

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 2, Februaro, 2008

“Reloj ligas landojn, Esperanto - la popolojn!”

Ĝuste tiel komencis sian prelegon dum la lasta kunsido de nia E-societo s-ino Elena Mateeva-Terjung, nia gasto, kiu estis ankaŭ ĉef-parolinto dum la lasta Zamenhofa bankedo'2007.

Dum sia multjara laboro por transportaj entreprenoj en Bulgario, Irako, Germanio, ŝi senlace agis por apliko de IL en agado de fervojistoj. Nun s-ino Elena estas aktiva membro de la Germana E-a Fervojista Asocio (GEFA), historian de kiu ŝi rakontis al ŝikagaj gesamideanoj.

La unuaj E-istoj-fervojistoj aperis antaŭ 100 jaroj, kiam estis fonditaj la unuaj fakaj grupoj en Leipzig kaj Dresden. La saman jaron oni fondis Unuiĝon de Germanaj Fervojistaj Esperantistoj. La lasta daŭrigis sian funkciadon post la I Mondmilito, regule aperiginte de 1921 “Informiloj”n kun la grava rubriko de fervoja terminaro. Apero de la unua vera “Fervoja vortaro germana-E-a” estis la plej signifoplena okazo de 1923.

Eventoj en Germanio de 30-aj jaroj por longa tempo ĉesigis la agadon de la lokaj e-istoj. Kiel dato de novfondo de Fervojista E-sekcio en la Germana E-Federacio validas pentekosto de 1948. En la sama jaro en Amsterdamo fondiĝis Internacia Fervojista E-Federacio (IFEFE). Okaze de tio la “Fervoja sociala entrepreno” (BSW) postulis, ke ankaŭ la germanaj fervojistaj E-istoj fondu apartan grupon en BSW kaj en 1950 ĝi ekis sian laboron. Samjare en aŭstra urbo Salzburg okazis la 2-a postmilita kongreso de IFEFE, kiun unua-foje partoprenis germanaj E-fervojistoj. La unua jarkunveno de GEFA okazis en 1957 en Fulda.

Oni denove esprimis bezonon verki fervojan fakvortaron en E-o. Seninterrompe oni laboris pri la E-fakvortaro surbaze de UIC-vortaro (Unuiĝo de eŭropaj fervojoj), kiu tiam ampleksis ses lingvojn.



Ekde novembro 1952 GEFA posedas sian propran organon, la hodiaŭan “Fervoja E-isto”. En 1958 en Mainz okazis UK, kie la germanaj E-fervojistoj enstalis oficialan fervojan informejon kaj biletĝiĉeton. Similajn aranĝojn okazis poste dum la UK'74 en Hamburgo kaj UK'85 en Augsburg kaj dum la kongresoj de IFEFE, okazintaj en Germanio en 1967 (Fulda) kaj 1981 (Regensburg).

En la jaro 1988 estis preta la E-traduko de UIC-vortaro, anhavanta pli ol 14 000 fakvortojn el la fervoja mondo. Post du jaroj al la sep-lingva vortaro estis aldonitaj multaj aliaj lingvoj, nun – 20, inter kiuj ankaŭ IL Esperanto.

En Oktobro 1989 fervojistan jar-kunvenon en Verden-ĉe-Aller unuan fojon partoprenis kolegoj el la iama GDR. Kaj pasintjare je la unua fojo IFEFE-kongreso okazis ekster Eŭropo, en ĉina urbego Ŝanhajo – partnera urbo de Ŝikago.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

“Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj.”

Tiel Erik Carlsson, antaŭ pli ol 37 jaroj anoncis la belan ideon pri la starigo de tiu ĉi grava jara evento, kiu signifas egalecon inter homoj kaj nacioj; solidarecon inter ĉiuj gentoj; respekton de homaj rajtoj.

Pluraj E-grupoj aranĝas komunan vespermanĝon aŭ skribas bildkartojn al malproksimaj geamikoj, aliaj organizas ekskurseton, aliaj donacas librojn al fora E-grupo. La eblecoj ion fari estas abundaj, sufiĉas iom da bona volo.

Oni invitas vin ĉiujn partopreni en tiu ĉi celebrado. Kaj, se vi ion aranĝos, bonvolu informi nin kaj ni informos la aliajn, kiuj povos imiti vin kaj ricevi instigon al simila agado.

FORPISIS... CLAUDE PIRON



Ja giganton ni perdis. Giganto je diversaj fakoj kaj faktoroj: psikologio, beletro, movado, lingvistiko, interpretado, kaj homeco. Julie Karlo Offutt rakontis pri la filmo "Gerda malaperis" kaj ni eksciis ankaŭ pri la fama Zagreba metodo, unu el aŭtoroj de kiu estis Claude Piron (1931-2008). Li esperantistiĝis en 1945, belgo, loĝanta en Svislando, membro de la Akademio de Esperanto, Honora membro de

Universala Esperanto-Asocio, ano de Esperantlingva Verkista Asocio. Instruis Esperanton ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko. Majstro de verkado en parola E-o, aŭtoro de multaj E-libroj. Li certe majstris: ĉu fakte ĉu fantazie. Li klare montris al ni, kial nia amo al E-o pli kaj pli radikiĝis en nia menso kaj penso. Ni esperegas, ke ni daŭrigos lian penadon por la prosperigo de la bona lingvo kaj ties interna ideo.

...DONALD J. HARLOW

Forlasis nin amiko, samideano, kaj unu el la plej brilaj steloj en la Esperanta ĉielo. Don naskiĝis en 1942 en Portland, Oregon, en 1959 li aĉetis Esperantan lernolibron kaj studadis sole, ripetante ĉiujn vortojn ĝis li sentis sin kompetenta, sed neniam aŭdis kiel sonas parolata Esperanto. Ankoraŭ en la aerarmea servo, Don kun Anjo translokiĝis al Anglujo, por dum kvin jara restado tie. Loĝante tre proksime al Londono, ili aliĝis al la Londona Klubo, tie Don estiĝis dumviva membro de UEA. Don estis Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA 1979-1983, Sekretario 1984-1986, poste Prezidanto de ELNA 1994-1996, kaj Redaktoro 1987-1995, poste vicdirektoro 2002 kaj je la foriro de Joel Brozovsky en 2005 estiĝis direktoro, kiun postenon li okupis ĝis 2007, kiam lia sanstato devigis demision. Don estis unuanime nomita Honora Membro de ELNA. Li ricevis specialan rekonon de UEA en 2007 per nomumiĝo al nova kategorio de Honora Membreco, "Diplomo pri elstara agado por Esperanto". Li estis la unua kiu ricevis tiun honoron. Tiuj, kiuj tiom profitis tra la jaroj de la bonhumoro, scio kaj scipovo kaj helpemego de Don scias, ke li estis vera modelo de homo kiu dediĉis sian vivon al Esperanto kaj Esperantistoj. Ni longe sentos lian mankon.



Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

26an de Februaro – memorgesperado dediĉita al forpasintaj C. Piron kaj D. Harlow

25an de Marto – d-ro L. Kordylewski rakontos pri Veliĉka sal-minejo

22an de Junio – tradicia pikniko

